ANTAŬEN
suplemento de Informilo
3/22 Septembro 2014

❖❖❖

La monumenton formis kvin virinaj figuroj, kiuj kiel simboloj de la mondpartoj ĉirkaŭligis globon per floraj girlandoj. Sur la granda bazo de soklo (tri metrojn en la diametro), li kreis kvar metrojn altajn eĝohavajn kolonojn, la interspacon por lokiĝo de diskoj. En supra parto de la soklo estis sur ĉiu flanko lokita kvinpinta verda stelo, kiu iĝis de la jaro 1905 oficiala emblemo de la Esperanta movado. Sur la fronta parto estis bronza disko kun reliefo de la fondinto de Esperanto, sur la malantaŭa estis diskoj kun la nomoj de la donacintoj, kiuj kontribuis por la monumento per pli granda sumo ol 100 kronoj.

Kiam la urba konsilantaro decidis pri la mono por la monumento, aŭdiĝis voĉoj, se Esperanto malaperos, ke ne estas necese konstrui la monumenton k.s. Aliaj voĉoj kontraŭstaris pro tio, ke la monumento ne estos germana, sed internacia.
La plimulto da funkciuloj fine decidis, ke la urbo Františkovy Lázně apartenas jam al la urboj de eŭropa formacio kaj liberala mondo.

La nova monumento, ĉizita el 50 kalkŝtonaj blokoj do povis esti finita ĝis duono de la monato majo.

Dum bela pentekosta vetero okazis sukcesa tritaga kongreso en Františkovy Lázně; ĝia pinto estis senvualigo de la monumento ĉe la lageto en la kuracparko dimanĉe la 31-an de majo 1914. Jam aŭtune regis ĉe la urbaj funkciuloj kontento, ĉar dank´al la monumento la nomo de la kurac-urbo aperis en ĉiuj signifaj ĵurnaloj. Oni diris, ke tiel bonan kaj efikan reklamon

ankoraŭ neniu sukcesis fari. Oni diris ankaŭ tion, ke en Františkovy Lázně bone kaj konkorde vivas kaj bone komprenas unu la alian ĉeĥoj kaj germanoj.

Tiu ĉi pozitiva bildo pri la kurac-urbo, konstruita dum pluraj generacioj, brutale detruiĝis pro okupacio de la naziisma Germanio kaj kiel la unua el multaj detruoj de la civilizita mondo estis ruinigita la monumento de Esperanto.

En la lasta spuro el oktobro 1939 oni skribis, ke la urbo fordonas por armilaj rezervoj bronzajn reliefojn kaj du bronzajn tabulojn, kiuj pezis 19,80 kilogramojn el la ruinigita E-monumento.

Post **52** jaroj, en la jaro 1991 instalis Josefo Vaněček, la sekretario de la Asocio de E-handikapuloj, sur la loko de likvidita monumento, la novan memorŝtonon omaĝe al la fondinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof. Ĉe la unua Internacia kongreso de AEH en julio 1992 la memorŝtono estis oficiale senvualigita.

La ĝojo pri la anstataŭa monumento ne daŭris longe. En la jaro 1994 juna ebria vandalo rompis la tabulon.

Ĉe la dua E-kongreso de AEH en Kladno 1994 kaj ĉe la posta ekskurso al Františkovy Lázně estis instalita nova tabulo helpe de AEH (Asocio de Esperantistaj Handikapuloj), ĈEA (Ĉeĥa Esperanto-Asocio) kaj helpe de eksterlandaj sponsoroj.

En plua jaro la tabulo el la memorŝtono estis ĵetita en proksiman lageton, sed ne estis rompita kaj tiel povis esti alfiksita sur la ŝtonon prizorge de la Urba oficejo.

En tiu tempo estis la tabulo skribita nur en Esperanto kaj ni estis informitaj, ke kuracgastoj, kiuj ofte haltadis antaŭ la memorŝtono, cerbumis, en kiu lingvo estas la teksto skribita. Kaj tiel la ŝtono post kelkaj jaroj (en la jaro 1999), ricevis ankoraŭ pluan tabulon – pli malgrandan, kie en la ĉeĥa lingvo estas ĉio klarigita.

Noto de la redakcio:
Nia membrino ĵus kuracis sin en Františkovy-kuracejo kaj vidis ĉe nia monumento, ke la literoj sur la tabuloj estas jam tre malbone legeblaj. Ankaŭ la kadro de la tabulo bezonas plibonigon.

Ŝi iris al la urboficejo demandi, ĉu ili havas ian metiiston, kiu povus ripari la monumenton, por ke ni povu la riparon mendi ĉe li.

La simpatia oficistino respondis al ŝi, ke venontjare printempe estos riparitaj ĉiuj statuoj kaj monumentoj en la parko, kaj ke ili riparos ankaŭ nian monumenton. Do ni esperu, ke ili ne forgesos nin.

Kompilis Jarmila Rýznarová